

Heinrich Heine,  
Milde fluas tra la  
kor’

*tradukita de Valentin Melnikov*

Milde fluas tra la kor’  
kanto primavera.  
Flugu, melodi-sonor’,  
en la vast’ aera.

Flugu longe, sen ripoz’,  
super domoj flutu.  
Se troviĝos tie roz’ –  
ĝin de mi salutu.

*Traduko de la Germana poemo  
“Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de Valentin Melnikov.*

*Arg-527-1044 (2010-03-15  
17:53:18)*

*Tiu ĉi poem-esperantigo  
estas - kun permeso de s-ro  
Valentin Melnikov - prenita  
el ties reta kolekto <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov> . Vidu: <http://www.esperanto-mv.pp.ru/Melnikov/Heine.html> .  
Vidu ankaŭ: <http://www.esperanto.mv.ru/Melnikov/index.html> .*

Heinrich Heine,  
Softe vibras tra  
l’anim’

*tradukita de Kálmán Kalocsay*

Softe vibras tra l’anim’  
melodi’ tenera,  
flugu al la malproksim’,  
kanto primavera!

Flugu al florbeda dom’,  
kaj se tie ĉarme  
ridos roz’, en mia nom’  
ŝin salutu varme.

*Traduko de la Germana poemo  
“Frühlingsbotschaft” de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de KÁLMÁN KALOCSAY (Kalmano Kaloĉajo, \*1911 – †1976).*

*Arg-527-1088 (2010-05-27  
11:29:19)*

*El la poezia volumo “Kanzonoj  
de Heine”.*

Heinrich Heine,  
Frühlingsbotschaft

Leise zieht durch mein Gemüt  
Liebliches Geläute  
Klinge, kleines Frühlingslied,  
Kling hinaus ins Weite.

Kling hinaus, bis an das Haus,  
Wo die Blumen sprießen,  
Wenn du eine Rose schaust,  
Sag, ich laß sie grüßen.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo  
estas HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 – †1856-02-17).*

*Arg-527-1043 (2010-03-14 15:54:47)*

*Tiu ĉi poemo troviĝas inter-  
alie ankaŭ en la reta kolekto  
“Gutenberg.Spiegel” sub [http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xid=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb\\_found](http://gutenberg.spiegel.de/?id=5&xid=1136&kapitel=10&cHash=3da378c6dbfruehlin#gb_found) .*